

Fajrero_{n-ro} 1

ESPERANTO-FAKO DE ZK ROH "TŘINECKÉ ŽELEZÁRNY"

ČSSR EN 1961 - 1965

En la dua kvinjara plano ni finkonstruis la socialismon. En la tria kvinjara plano ni daŭrigos agadon por elkrei socion de sanaj, kleraj kaj kulturaj homoj. Al tiu ĉi celo direktas nia politika kaj ekonomia penado jam dum 15 jaroj kaj ni povas konfesi, ke ni hodiaŭ kontentigas ĉiujn fundamentajn bezonojn de homo.

Por iom skizi la kreskon de la nivelo precipe en la tria kvinjara plano ni konscias, ke en 1965 ĉiu dua familio en ČSSR havos televid-aparaton, ĉiu tria familio havos glaciŝrankon, ĉiu kvara motociklon aŭ skuteron, ĉiu deka aŭtomobilon . . . Laborsemajnon ni mallongigos je 5 labortagojn, por ke ni havu pli da tempo por amuzo, ripozo, studo, sporto, familio, por publikaj porsociaj laboroj k.a.

Sed tiun ĉi staton ni ne povas establi per i a dekretado. La celon ni devas atingi nur per plua disvolvo de produktad-fortoj en ĉiuj branĉoj de produkcio, per lerta aplikado de la moderna tekniko, per konstanta kaj rapida kresko de socia labor-produktado.

La entuta nivelo de nia produkcio en 1965 egalos al 6-oblo de tiu en la kapitalisma ĈSR. Ĝi postulos profundan modernigon de maŝinekipoj, tiu ĉi dependos de sufiĉaj metalfontoj. En la tria kvinjara plano ni plu kreskigos nian pezan industrion. Nia lando fariĝos monda metalurgia potenco dank' al novaj ŝtalfabrikejoj en la Nordmoravia regiono de Ostrava kaj dank' al konstruata giganto VSŽ apud Košice. En 1963 ni fabrikos 730 kg da ŝtalo je unu loĝanto.

Nian celadon ni tiel starigos sur firmajn ŝtalajn fundamentojn. Tiel niaj planoj neniam estos iluzioj, 30%-a kresko de persona konsumo bazita sur 56%-a kresko de la industria produkcio en 1965 kompare kun la nuna stato estas ĝojiga perspektivo de nia popolo.

jer

SOMERAJ ESPERANTO-TENDAROJ 1961.

Denove komencis funkcii "preparkomitato" de SET. Kun ĝojo ni povas informi vin, ke nia ekzemplo instrui en naturo trovis fekundan terenon jam en multaj landoj. Venis demandoj el Pollando, Bulgario kaj Sovetio. Dank' al oferema laboro de nia junularo havas SET en ČSSR fortajn radikojn. Alta nivelo de la tendaro dependas de ties preciza kaj serioza preparo. Teknika ekipo de nia tendaro, kiu denove okazos en Lančov apud valbaraĵo de Vranov, estos pli alta, dank' al spertoj de la teknikaj aranĝatoj el Třebíč. Ni nunjare klopodos, ke povu nian tendaron viziti kelkaj fremduloj. Tiu fakto kaŭzis, ke la Esperanta grupo en Třebíč publikigas jenan alvokon: Helpu al ni nunjare konstrui modelan SET. Ni bezonas renovigi subtendaĵojn kaj niaj fortoj ne sufiĉas por tiu tasko. Esperantaj rondetoj povus konstrui po unu subtendaĵo je propraj kostoj, kaj sendi ĝin al Lančov. Precizajn

mezurojn vi ricevos ĉe:

Pavel Sittauer, Třebíč, Riegrova 62.

Ni kredas, ke komprenemo de esperantistoj rezultigos grandan eĥon kaj kontribuon al kvalita ekipo de nia ĉijara tendaro. Por nuna jaro ni volas ĉion prepari tiel precize, ke SET estu ĉiuflanke perfekta. Ni volus, ke nova ekzamena komisiono havu en SET 1961 kunsidon. Interesuloj pri instruista ekzameno havos eblon plinombrigi vicojn de niaj instruistoj.

Ni atendas, ke tuta esperantista publiko komprenos, ke SET estas nia universitato, ke ĝi havas por la movado grandan signifon, ĉar edukas novajn instruistojn kaj entuziasmajn laborantojn por Esperanto-movado. Ĝi donas novajn perspektivojn kaj samtempe refreŝigas nin, ĉar ĝi okazas en tre bela angulo de nia patrujo.

Ni petas, ke ĉiu klubo organizu specialan programon por propagandi SET. Tre helpos al vi kolekto du belaj diapozitivaj el SET 1960, pruntebla ĉe s-no V. Novobilský, Ústí n. L., Slavíkova 346 kaj filmo pruntebla ĉe s-no Pavel Sittauer, Třebíč, Riegrova 62.

Ni informas pri terminoj (ankoraŭ nekonformitaj)

Unua etapo 16.7.1961 - 29.7.1961

Dua etapo 30.7.1961 - 12.8.1961

Krome ni informas, ke la esperantista rondeto en Bratislava preparas Someran Esperanto-Kolegion en Trenčianské Teplice en la tagoj 13.8.1961 – 26.8.1961.

Ni tre ĝojas je la revido!

D. Kočvara

HELPU PER ESPERANTO AL MONDPACO!

Multaj Esperanto-rondetoj tiurilate jam eklaboris.

1. Estis ligita aktiva kunlaboro kun loka Komitato de pacdefendantoj.
2. Dum klubaj programoj estas pritraktataj pacaj aktualaĵoj, poste uzataj por eksterlanda korespondado.
3. Estas dissendataj al eksterlando bondeziroj ĉe okazo de ŝtataj festoj.
4. Estas presataj glumarkoj, poŝtkartoj kun pacaj motivoj.
5. Paroladoj kun lumbildoj kontraŭ atombomba milito kaj simile.

Certe ekzistas ankoraŭ multe da aliaj ebloj kiuj estas praktikataj, sed ni ne scias pri ĉiuj. Tio estas domaĝo, ĉar aliaj rondetoj povus profiti, se ili havus sufiĉe da ekzemploj. Mi petas ne forgesu, ke temas pri agado, kiu plifortigas pozicion de la Esperanto-movado. Ne hezitu kaj skribu raporton pri via porpaca laboro al s-no Jos. Ed. Ambrož, Brno - Židenice, Špačkova ulice č. 3., kiu estas en la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato estro de la Mondpaca Esperanto-Movado.

-dra-

PLENUMITA SONGŔO.

Ĉiuj homoj sur la tero songas. Unu pri pano, alia pri aŭtomobilo. Sed plejmulto de la teraj civitanoj songas pri vizito de malproksimaj landoj. Akaŭ mi songis de mia junaĝo ĝis la septembro 1960, kiam mi unuafoje veturis trans la maron por longtempa

deĵoro en eksterlando.

La 26-an de septembro mi forflugis per TU 104 al Kajro. Mi ne plu songis, sed eniris kuraĝe mian novan vivon, kiu ne similis al songo.

Unue min tre influis, ke nur post kvarhora flugo mi aperis en lando, kiu havis nenion komunan kun aĵoj kaj homoj en mia naskiĝlando. Tiun ŝanĝon devas travivi ĉiuj, kiuj uzas servon de plej rapidaj aeroplanoj en la mondo. Homo eniras aeroplanon en Praha, iomete manĝas dum flugo, iomete babilas, iomete rigardas blankajn nubojn, kiuj kuŝas sub la aeroplano kiel vastega maro. Homo babilas, rigardas nokton, kiu venas el oriento, rigardas nubojn super la Mediteranea Maro, rigardas unuajn lumojn de urboj en Egiptio, sentas pli kaj pli varmecon kaj fine ekvidas milojn da brilantaj lumoj – Kajron! Kaj post tiu mallonga kvarhora flugo homo trovas novajn aĵojn kaj novajn homojn. Tute novan mondon - Afrikon.

Due, homo estas konfuzita per ĉio nova kaj devas serĉi kaj trovi novan stilon de sia vivo en la lando kie moderneco miksiĝas kun mezepokaj, al ni komence nekompreneblaj vivelementoj. Homo devas trovi pasvojon same kiel li devis trovi ĝin en sia malnova vivo.

Konfuzo. Tiel mi juĝis vivon en trimiliona ĉefurbo de Egiptio dum unuaj tagoj, kiam mi rigardis centojn da modernaj aŭtomobiloj veturantaj tiel, ke mi nomis la trafikon jene: "veturu kiel vi volas kaj povas." Ŝoforoj ĉi tie ne devas scii regulojn de trafiko teorie, oni diras, ke en Egiptio ekzistas neniuj oficialaj reguloj por aŭtomobila veturado, escepte kelkajn plej gravajn regulojn, kiel: veturu dekstre, haltu kiam aperis ruĝa vojkruciĝlumo, ktp. Mi vidis kelkajn akcidentojn kaj kelkajn aŭtomobilojn, kiuj ne similis post akcidento al aŭtomobiloj, sed oni diras, ke en komparo kun nia trafiko, kiu ne estas tiel abunda, ĉi tie okazas malpli da akcidentoj ol en nia lando. Kaj mi ne menciis unu gravan faktoron, ke ĉi tie promenantaj homoj estas pli danĝeraj por la trafiko ol la niaj.

Sed mi ne volas paroli nur pri trafiko, mi preferas paroli pri homoj kaj pri aliaj interesaj aferoj kaj aĵoj ĉi tie.

Mi devas diri, ke eĉ mi ne estis bone informita antaŭe pri la vivo en Egiptio, ĉar min surprizis malhelaj, senfenestraj dometoj en vilaĝoj kaj enorma diferenco inter la riĉuloj kaj la plejmulto de ordinaraj, malriĉegaj, malpuraj homoj, kiujn vi renkontas ĉiun sekundon. Mi estis surprizita, ĉar en nia lando ne plu ekzistas io simila, kiam mi aŭdis gurdon kaj kiam min atakis infanoj, almozetantaj. Mi estis surprizita, sed ne ŝokita, ĉar mi iomete komencis kompreni al vivo de tiu orienta, afrika lando.

Mi volus dividi inter mi kaj vi la spertojn, miajn portempe limigitan konon de Egiptio, sed pri kio paroli antaŭe, ĉu pri vizito de palaco MONTAZA ĉe marurbo Alexandria, kie eksreĝo FARÚK havis sian someran restadejon, ĉu pri aŭtomobila veturado trans la dezerto kaj subita akvofalo, kiu rompis trafikon sur ŝoseo meze de la dezerto, ĉu pri meŝito ([ĝuste: moskeo – rim. mm](#)) CITADEL en Kajro, kiun vizitas ĉiu eksterlanda turisto, ĉu pri marbanado en maro Mediteranea, kie estas altaj ondoj kaj sala akvo kaj en maro Ruĝa, kie estas koraloj, diverskoloraj fiŝoj kaj ankaŭ sala akvo, ĉu pri vesperoj ĉe mondfamaj piramidoj konstruitaj antaŭ 4300 jaroj, ĉu pri simpatiaj tendencoj ligitaj kun konstruado de novaj fabrikoj kaj speciale de altega baraĵo ĉe Assuan, ĉu pri promeno tra malpuraj strategoj en Kajro, ĉu pri rivero Nilo,

kiu silente fluas, same, kiel ĝi fluis dum lastaj jarcentoj, aŭ pri vizito de fama Egipcia muzeo, kiu enhavas statuojn, aĵojn kaj valoraĵojn faritajn antaŭ 3000-5000 jaroj, speciale tiuj de reĝo Tutankhamon? Mi ne scias kaj pro tio mi finos mian unuan leteron al vi, al miaj geamikoj en Eŭropo, kun promeso, ke - se vi deziras - mi skribos al vi de tempo al tempo leterojn pri aĵoj kaj vivo en lando de malnovepoka kulturo, mezepokaj, profunde fiksitaj elementoj de vivo, kaj modernepokaj, relative progresemaj signoj, kiuj ankoraŭ longegajn jarojn kunvivis komune, donante neripeteblan aspekton de nuntempa Egiptio.

Egiptio – Kajro, 19.12.1960.

Via Zdeněk Čapek

Josef Cink

Li venas kun siaj promesoj
Kiam vi estos plenaĝa
Kiam vi finos studojn
Kiam vi edziĝos
Kiam vi atingos postenon
Kiam ...
Kiam ...

Sed subite li silentas
Ĉu li havas nenion plu

Li iras ĉiam kun ni
Vizaĝon en nebulo
Kun neklara jaj tremanta lumeto
Li ne promesas
Ofte ne havas kion promesi
Sed li estas kun ni
Nevidebla
Ĉiam

Du niaj amikoj
Tempo kaj espero.

STENOGRAFIO KAJ ESPERANTO

Estas konvene diri tuj ĉe la komenco, ke kiu scias stenografion, ŝparas sian tempon. Tial la soio de la stenografio estas natura kompletigo de scio de Esperanto.

La stenografio havas bonan tradicion inter esperantistoj. La unua stenografia E-lernolibro aperis en 1897 en Svedlando. Preskaŭ ĉiuj nuntempaj stenografiaj sistemoj estas adaptitaj por Esperanto.

En decembro 1959 oni povas legi en gazetoj, ke Prof. Tomáš Vandas skribis ĉe

stenografia konkurso en Praha en 9 lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto. Tia afero okazis unuafoje en la historio de la stenografiaj konkursoj en nia lando.

Per Esperanta mi havigis por biblioteko de Ŝtata stenografia instituto en Praha stenografiajn lernolibrojn en multaj Eŭropaj landoj kaj ankaŭ el Ĉinio kaj Izraelo. En la revuo "Těšnopisné rozhledy" estis jam kelkfoje esperanto menciita. Slovaka stenografia lernolibro por ĉiuj ekonomiaj lernejoj "Stenografia II" de Josef Mistrik enhavas artikolon pri Esperanto (eldonis en 1955 kaj 1959).

Dank' al Esperanto publikigis franclingva revuo "La Verité Sténographique" artikolojn pri stenografio en USSR, ĈSR, kaj artikolo pri stenografio en Ĉinio aperis krome en tiu revuo ankaŭ en la bulgara "Stenografski pregled".

Malgrandaj informoj pri E-stenografio en la Fajrero n-ro 1/1959 vekis intereson inter la samideanoj. Pluraj interesuloj anoncis sin – tamen mi ne povas meti la prefikson ge- antaŭ la vorto interesuloj!

Ankaŭ la ĉs. sistemo Herout-Mikulík estas adaptita por E. La unua adapto estis farita de Heřman Prokop en 1934, la dua devenas de mi kaj aperis 1950 en tiama revuo "Esperantista", Praha.

Tamen la sistemo Herout-Mikulík estas de tiu tempo forte evoluinta kaj speciale la junaj samideanoj kiuj lernis tiun sistemon en ekonomiaj lernejoj aŭ en kursoj dum lastaj 10 jaroj per sia patra lingvo, trovas ambaŭ adaptojn malkomformajn al siaj scioj. Al mi estas eble ellabori ian lernolibron por komencantoj ĉar la reguloj da la sistemo HM estas tro ampleksaj. Sed mi povas al ĉiu, kiu lernis la sistemon por sia patra lingvo, doni ĝeneralajn konsilojn, kiel skribi tiun aŭ alian literon, litergrupon prefikson, sufikson kaj kiel mallongigi. Kiu ne scias ankoraŭ ian stenografion, povas de mi ricevi lernolibron de E-stenografio Duployé-Flageul. Ankaŭ la trimonata revuo "Fluganta Skribilo" estas ĉe mi havebla. Skribu al: Adolf Staňura, Čkalovova 863, Ostrava-Poruba.

NIA SPEGULO

Agad-plano de E-rondeto ĉe ZK de TŽ VŘSR por la I-a kvaronjaro 1961

Ĉiumarde je 17.30 h. kurso por komencantoj, post la 18.30 h. konversacia vespero por progresintoj,

24.1.1961 prelego okaze de la 37-a datreveno de la morto de V. I. Lenin,

31.1.1961 resumo de politikaj okazintaĵoj en januaro,

7.2.1961 komitata kunveno de E-rondeto kaj supervido pri la E-literaturo,

13.2.1961 prelego pri Bulgario - prelegos reprezentato de Bulgara kultura centro el Praha, kun projekciado de koloraj filmoj,

28.2.1961 prelego pri signifo de la 25-a de februaro por la Ĉeĥoslovaka laboristaro,

7.3.1962 rememorigo de la Internacia Virina Tago,

28.3.1961 prelego pri J. A. Komenský, pioniro de internacia lingvo,

Por la monato marto ili planas prelegon de Prof. Kilian pri Hispanion - la preciza dato ne estas ankoraŭ konata.

Laŭ la interkonsento farita dum la seminario en Štířín, anoj de E-rondeto en Třinec jam kolektis 427 kg da uzita papero. Per tiu ĉi kolekto ili volas helpi al aldono

Esperantaj lernolibroj, vortaroj kaj aliaj presaĵoj. La kolektadon oni daŭrigas. Estas necese, ke ankaŭ la aliaj rondetoj jam komencu la kolektadon. La konfirmilojn sendu al Osvětový ustav - Ĉs. Esp. komitato, Blanická 4, Praha 12.

Kiel Ústí nad Labem eniris novan agadjaron.

La 23-an de novembro 1960 okazis en Ústí n. L. malferma kunveno, kiun ĉeestis 50 personoj, progresintoj kaj komencantoj en Esperanto. Estis prezentita pralego pri la Esperanta-movado kaj ĝia tasko, fare de s-no Ing. Tomáš. Samideano J. Kűchler, prezidanto de la grupo, parolis pri la ĝisnuna agado de la grupo kaj menciis precipe nian internacian kontakton kun la grupo en Quedlinburg, GDR kaj en Sofio, Bulgario, la prelegojn de s-no Griniatsos kaj Kei Kurisu en Ústí n. L.

La ĉeestanta direktoro da la Parko de Kulturo kaj Ripozo esprimis sian admiron pri la riĉa agado de nia grupo kaj pri la ĉeesto de tiom multaj junaj homoj en niaj vicoj. Li promesis ĉiuf flankan subtenon, inkl. propagandon de la kursoj pere de urba lumgazeto. - La kurso de komencantoj havas 25 aliĝintojn. - van -

LA MOVADO EKSTERLANDEN.

La III-a Tutpollanda Kongreso de E-junularo okazos 3-5-en de marto ĉi-jare en Bydgoszcz.

Krom oficiala parto kaj kongresa traktado en la programo estos interkonatiĝa vespero, vizito de urbaj vidindaĵoj, artista programo de opera kaj opereta teatro de Bydgoszcz, danco kaj amuza programo kun akompano de kabaredo "Verda simio" el Varsovio kaj scen-programoj de aliaj amatoraj grupoj. - • -

Tutpollanda Kongreso de Instruistoj-Esperantistoj okazis en la tagoj 3-5 de januaro 1961 en la salonego de ZNP en Varsovio. La kongreso traktis pri la laborplano por la jaro 1961, pri propago de Esperanto en la lernejoj kaj junular-organizoj pri feriaj kursoj por instruistoj, pri dumferia interŝanĝo de instruistoj, kun eksterlarido. Oni ankaŭ fondis instruistan sekcion ĉe PEA.

-.-

En proksima tempo estos eldonita pere de holanda libroeldonejo Elsevier en Amsterdam 16-lingva medicina vortaro "Quaestionarium Medicum", inter kiuj estas ankaŭ Esperanta parto.

-.-

Ĉu la 47-a Universala Esperanto Kongreso okazos en Vieno? Laŭ la informo de unu komitatano de Aŭstria Esperanto-Asocio tiu ĉi organizo intencas proponi Vienon por la 47-a UEK en la jaro 1962.

-.-

Pola kuracistino D-ro W. Galinowska publikigis raporton pri la vojaĝo kaj restado inter la esperantistoj en Grekio, kie ŝi partoprenis eŭropan kongreson de kuracistoj-okulistoj. Ŝi estis tre gasteme akceptita de grekaj gesamideanoj, kvankam ŝi estis komence iom strange rigardata de resto da partoprenantoj - ŝi ja estis unusola kongresanino de post "Fera kurteno". Tamen post nelonga tempo ŝi gajnis fidon kaj veran interamikiĝon de ĉiuj kun kiuj ŝi kontaktis.

Pluaj Zamenhof- kaj Esperanto-stratoj.

Laŭ la lastaj raportoj de la esperantista gazetaro, estis fine de pasinta jaro en

dekaj urboj nomitaj stratoj honore al D-ro Zamenhof kaj Esperanto. En Belgio, urbo Anderlecht - Avenuo D-ro Zamenhof, en Germanio, urbo Stuttgart – Zamenhof-strato, en urbo Hamburg – Zamenhof-strato, k.s.

Decido de UNESCO, celebri D-ron Zamenhof kiel unu el grandaj personecoj, efikis en pluaj landoj. En Finnlando en ĉiuj lernejoj laŭ la instrukcioj de la kompetentaj edukaj instancoj kaj surbaze de materialoj pri Zamenhof oficiale liveritaj de tiuj instancoj okazis prelegoj pri Zamenhof.

Same en Jugoslavio en ĉiuj lernejoj estis festata la 100-jara datreveno de lia naskiĝo.

ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKA GAZETARO!

"Svět sovětů" N-ro 2 (Praha 11.1.1961) - Skizo de Maxim Gorkij, publikikita en ĈSSR unuan fojon - en artikolo "Jedinečný člověk" (Unika homo) mencias kelkfoje pri Esperanto en favora senco.

Ekspozicio kiel instigo.

En metilernanta hejmo de VŽKG n-ro 4 en Ostrava-Hrabůvka bone progresas la kurso kun 15 lernantoj. La 15.II.1961 ili aranĝis ekspozicieton de propraj korespondaĵoj por la ceteraj lernantoj.

Studentaj kursoj en Místek.

En 11-jara lernejo en Místek Prof. Buzek gvidas 2 kursojn. En unu estas studentoj 14-jaraj, en la dua 17-jaraj. Ili ĉefe korespondas pri geografio kaj volas kontaktiĝi kun lerneĵ--rondetoj en nia Nordmoravia regiono.

Intervjuo pri Esperanto.

La 5-an de februaro 1961 efektiviĝis en la salonego "Na Rybníčku" en Opava okaze de kultura antaŭtagmezo intervjuo pri laboro kaj atingoj de Esperanto.

En la intervjuo respondis nia inĝenierkandidato Vlastimil Kočvara.

LINGVA ANGULETO.

Ĉu skribi "esperanto" aŭ "Esperanto"?

La vorto "esperanto" estas homanimo, ĉar signifas

a) lingvon internacian ,

b) esperantan homon.

Por eviti eventualan miskomprenon en tekstoj ni skribas la lingvon majuskle "Esperanto" kaj esperantan homon minuskle "esperanto". Tiun ĉi teorion subtenas ankaŭ tiu historia evento, ke Esperanto kiel la nomo de lingvo estas fakte propra nomo, transprenita pseŭdonomo D-ro Esperanto, aŭtoro de la Unua Libro.

Kun majusklo ni skribu ankaŭ la rektajn derivaĵojn, adjektivon Esperanta, adverbos Esperante. Kun minusklo ni skribu ĉiujn ceterejn derivaĵojn kun afiksoj, ekz.: esperantisto, eesperantistaro, esperantaĵo k.s., ĉar ili ne povas leganton miskomprenigi.

W-er

ANONCETOJ.

MIGRANTA EKSPozICIO DE ESPERANTISTAJ INSIGNOJ

En marto - aprilo ekfunkcios migra ekspozicio de insinoj, kiujn kolektis Prof. E. Geleta. Li mem organizos la migradon kaj akceptas jam nun mendojn por dusemajna uzo.

Kiel pago li akceptos insigno/j/n.

Adreso: Prof. E. Geleta, Petöfi strato 15, A/4, Nové Zámky.

La ekspozicio povas ĉe la grupoj inspiri instruon pri la historio kaj gravaj organizoj de la movado, se iu membro scios vorte akompani la ekspoziciatan materialon.

ĈINA ANTOLOGIO

Kniha 2086 (Praha 1, Václavské nám. 42) akceptas mendojn por la libro "ĈINA ANTOLOGIO", kiu baldaŭ venos en sufiĉa kvanto.

INSTRUISTOJ.

Ĉe la regiona Domo de instruistoj de la Frunze-regiono de Moskvo estas rondo de pedagogoj-esperantistoj, kiuj deziras ligi kontakton kun eksterlandaj instruistoj-gvidantoj de Esperanto-rondetoj en mezaj lernejoj. Adreso: Moskvo G - 34, M. Levšinski per, I a, Rajonnyj Dom Učitelja, USSR.

AKADEMIO DE PEDAGOGIAJ SCIENCOJ interesiĝas pri la problemoj, kiun utilon alportas Esperanto al disĉiploj ekz. en geografio, alilandaj lingvoj, historio ktp. Instruistoj, lekciantoj pri Esperanto en mezaj lernejoj komuniku pri via sperto tiurilate. Adreso: Moskvo, Lobkovskij per. S/16 Akademium Pedagogičeskich nauk, Sektor Metodiki inostrannyh jazykov, USSR.

Fajrero estas bulterno de junaj esperantistoj en Nordmoravia regiono. Aperas laŭbezzone.

Februaro 1961, N-ro 1/1961.

Eldonas: ZK ROH Třinecké železářny VŘSR, E-kroužek.

Redaktas: Jan Pomykacz, Ing. Jan Werner, Jar. Novotný (responda)

Administras: Vl. Kočvara, Ostrava, Kamenec 3/251, Ĉeĥoslovakio